

esperanto

Belgio

Ostendo, la 17-an de decembro 2022

Kara samideano

Bonvenon al nia festo!

Ni estraranoj de *Belga Esperanto-Federacio* esperas, ke vi bone fartas kaj amuziĝos dum nia *Tutbelga Zamenhoffesto* ĉe la maro. Antaŭ kelkaj jaroj ekestis la tradicio kune festi, laŭ invito de unu el la lokaj belgaj Esperantogrupoj. Ni tre ĝojas, ke tiel estas almenaŭ unufoje jare bona amika kontakto inter la ĉefaj aktivuloj de nia lando - trans lingvaj kaj regionaj limoj. Gravaj tiaj ĉeestaj kunvenoj; ni ĉiuj forte sentis mankon je renkontiĝoj dum kovimo.

La mondo draste ŝanĝiĝis pro la kron-viruso, ankaŭ Esperantujo. Tio tamen donas al nia movado novajn ŝancojn, kondiĉe ke ni adaptas nin, kaj lernas "kiel funkcias nia nuntempa socio". Multaj homoj iom perdis esperon, ĉar malkreskadas la kluba agado. Reale tamen kreskas la nombro de parolantoj de Esperanto, la kvalito de la lingvouzo kaj ankaŭ la nombro de kunvenoj en la tuta mondo - ne nur la retaj! Eblas eĉ pruvi tion, ekzemple per la *Internacia Kalendaro de Eventa Servo* eventaservo.org/kalendaro kaj per ĝia taga kalendaro; vidu ekzemple en be.esperanto.events kiom da kunvenoj konkrete estas planitaj en nia lando!



Esperantistoj en 2022 ofte ne plu aliĝas al asocioj, nek abonas revuojn. Novaĵojn oni amase kaj senprobleme trovas rete, librojn oni legas per poŝlegilo en komputilo – ekzistas granda kolekto de senpagaj libroj. Ktp. Tio povas al kelkaj homoj doni impreson de malkresko. Estas la malo; Esperantujo kreskas kaj viglas, ni volas tion emfazi. Rigardu ĉirkaŭ vi dum la festo. Ni ne estas 10-oje, nek 30-oje, sed pli ol 60-oje. Bonege! Dankon pro via ĉeesto.

Sen asocioj – kaj sen iom da mono – ni esperantistoj tamen ne povas agi efike. Konkrete ne okazus hodiaŭ ĉi tiu festo, se ne ekzistus la loka asocio *La Konko*, al kies bankokonto vi ĝiris la monon por la bufedo. *La Konko* ne estus ricevinta subvencion de la urbo Ostendo por la projekto *Multlingva Akcelilo* – monon urboj kutime ne donas al privatuloj, sed nur al asocioj... Tio validas ankaŭ por *Erasmus+*, ekzemple. Sen oficialaj delonge ekzistantaj asocioj kiel *FEL* kaj *UEA*, Eŭropo ne estus donacinta monon por realigi projektojn. Mal-multaj homoj konscias pri tiaj aferoj. Tial jen nia alvoko: se vi volas antaŭenigi Esperanton en nia regiono, aliĝu al niaj asocioj, abonu niajn revuojn, kaj finance subtenu niajn agantojn.

Jen eta superrigardo, por via informo:

- Se vi aliĝas al Flandra Esperanto-ligo, vi ricevos la revuon Horizon-taal.
- Espéranto en marche estas la membrorevuo de Espéranto Wallonie.
- La brusela grupo refondis la revuon Aktuale! Petu provekzempleron de Nikolao.

Flandroj rajtas kompreneble senprobleme aliĝi al la brusela kaj valona asocioj, kaj inverse! Kaj al la tutmonda asocio UEA. Aliĝi al UEA povas esti aparte interesa, ĉar vi ricevos senpage la bitversion de Revuo Esperanto, kaj rabaton por la UK en Torino. La 3-a Virtuala Kongreso finiĝis, sed UEA-membroj povas registriĝi senpage por spekti la prelegojn. La platformo estos alirebla ĝis la 31-a de decembro 2022. Ne maltrafu tiun eblecon!



Se vi volas subteni retajn agantojn (kaj la personan beneluksan agadon de Yves), tio eblas per *Fonduso Instigo* instigo.be.

2022 estis tre sukcesa jaro por Esperanto en Belgio; ni rajtas esti fieraj. Fotojn kaj filmetojn kiuj “montras tion” vi trovos en la nova *Beneluksa Bitarkivo* benelukso.eu/bitarkivo.

Aparte sukcesa estis nia ĉi-jara *Beneluksa Kongreso* en Ipro. Ĉu vi sciis, ke en ĝia kongresa retejo benelukso.eu/kongreso aperas nuntempe komuna fotaro, filmetoj, la dokumentoj kiujn Piet disdonis dum la kongreso ktp? Esploru tiun paĝon kaj postĝuu. Cetere: ankaŭ pri la Beneluksa Kongreso en 2021 ekzistas tia arkiva paĝaro, vidu benelukso.eu/bk2021.

Pri 2023 eblas jam antaŭĝoji. Ni varme rekomendas al vi partopreni en la *Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso* en Antverpeno. Detalojn kaj aliĝilon vi trovos en la retejo ifef2023.net. Alparolu unu el la LKK-anoj, se vi konkrete interesiĝas – ni ĉiuj estas ĉi tie en Ostendo! La LKK konsistas en • *Kristin: kunordigo* • *An: sekretario kaj retejo* • *Piet: financoj kaj eksteraj rilatoj* • *Yves: informado* • *Marc: ekskursoj* • *Ite: kultura programo* • *Clara Bracke: akceptejo* • *Michèle: postkongreso*. Pripensu cetere ĉe Griet aliĝi al la Belga *Amikaro de Fervojistoj Esperantistaj* (BAFE); vi ricevos la revuon de IFEF kaj rabaton por la IFEF-kongreso.

Pluraj aliaj eventoj estas planitaj en nia regiono: *PEKO* de la *Verdaj Skoltoj*, la studo-semajnfino de *Esperanto Nederland*, nova *Beneluksa Kongreso* kaj interkluba semajnfino. Entuziasmo kaj planoj absolute ne mankas.

Ĉu io malklaras? Ne hezitu alparoli nin dum la festo aŭ kontakti nin poste. Ni estas je via dispono kaj pretas helpi.

Amike kaj re-danke

Claude Glady • Yves Nevelsteen • Kristin Tytgat • Flory Witdoeck